

# FLETERO

septembro 1979a.

INFORM-LETERO DE LA ASOCIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ EN LA REGIONO DE LA NEDERLANDA  
sekr.iino: Bethlehemstraat 23 e, 3061 GA Rotterdam. LINGVO.

## KIAL F-LETERO?

Jen vi trovas antaŭ vi tutan gazeton, kiun ni estis devigataj produkti por vi, kara membr-(in)o de F.L.E. Estas superflue diri ke pri tio kulpas la daŭre malfrua apero de Komuna Esperanto Gazeto. En la kernestraro-kunveno de FEM, la 19-an de majo pasinta, FLE klare esprimis sin pri la irado rilate al KEG. La nuna situacio ne estas pli favora ol la antaŭa, kiam alia teknika redaktoro okupiĝis pri la redakta laboro.

Estas ridindige, se oni legas komunikojn pri okazontaĵoj, kiuj jam delonge pasis. Ne nur por la membroj de la Esperanto-organizoj tio estas malagrabla afero, precipe por la estraroj devus esti pripensige, ke tiel oni donas impreson de kadukiĝo al la ekstera mondo. La publiko, kiu ekscios pri tiu malfruiĝo en la apero de gazeto, ridos pri la tuta Esperantomovado en Nederlando. Nu, ŝajnas al mi sufiĉe klare por pli insisti pri tiu punkto. Por ni, FLE, la rezulto estas ke ni ne povas aktuale informi niajn membrojn, ke fakte KEG en sia nuna formo estas ne uzebla por nia laboro.

En la kernestrarkunveno de FEM FLE postulis ke oni apliku severajn regulojn por la ensendo de materialo, ke oni fiksu limdatojn, kiuj estas limdatoj. Ĉar vi mem povis konstati, ke en kelkaj numeroj de KEG aperis informoj, kiuj ne povus esti aperintaj, se oni estus obeinta la striktajn regulojn. Ŝajne tio ne estas grava afero por kelkaj aliaj redaktoroj. Nu, tion ili sciu, sed ni ne povas toleri, ke pro tio nia rubriko en KEG estas tute malnova, malaktuala. La membroj ja plendas ankaŭ pri tio.

Ankaŭ rilate la korektadon kaj la proceduron por resendi la artikolojn tajpitajn al la teknika redaktoro ni klare esprimis nin en la kunveno. Estas kelkaj redaktoroj, kiuj deziras post dua (korektita) tajpado ankoraŭfoje korekti la tuton, ĉar ne devas esti eraroj en la teksto. Laŭdinda strebo, sed la rezulto estas ke denove la aperdato estas prokrastata.

Ni preferas gazeton kiu aperas ĝustatempe ol gazeto, kiu estas perfekta laŭ lingva kaj presa vidpunktoj, sed kiu tute ne plu estas aktuala kaj kiun ni tute ne povas uzi.

Ni esperas ke antaŭ la fino de la jaro la situacio draste pliboniĝos. Se ne, ni devos serioze konsideri eldonadon de propra gazeto. Tio estas sendube paŝo malantaŭen, sed kiu povas ja labori kun gazeto, kiun oni ne povas uzi? Krome ni estas devigataj regule per apartaj bultenoj informi niajn membrojn. Kaj tio ankaŭ postulas monon. (kvankam kompreneble ne tiom kiom KEG).

La estraro de FLE vidos, kiel la situacio disvolviĝos. Se necesas, vi aŭdos pli da informoj pri tiu afero kaj nome, ĉu necesas kunvoki apartan membro-kunvenon por decidi pri tio.

La prez.o

La nova propaganda sezono komenciĝis. Jam vi ricevos kun ĉi tiu gazeto afiŝon, kiun ni senpage disponigas al niaj membroj, ĉu por pendigi antaŭ la fenestroj, ĉu por meti ilin en lernejoj, bibliotekoj, kvartalcentroj, k.t.p. Eble la koloro ne tro plaĉas al vi, sed tio estas intence: oni ja ne povas ne vidi tian afiŝon!

Prepariĝis varbartikoloj diversspecaj pri kiuj vi legos en "FLE-Mallonge". Ni klopodas aperigi ilin en ĵurnaloj kaj revuoj. Vi ankaŭ povas meti la artikolojn stencilitajn en bibliotekoj aŭ aliaj ejoj, kie regule homoj venas. Vi povas propagandi per niaj novaj glumarkoj, la malgranda kaj la granda. Faldfolioj kun ĝenerala teksto aŭ maldekstra teksto estas haveblaj. Kelkaj ekspozicioj jam estas planitaj, sed povos okazi pli da.

Ni ankaŭ klopodas akiri intervjuojn en radio aŭ televido. Tion planas la laborgrupo, sed sugestoj de vi estas bonvenaj. Ankaŭ la laborgrupo pri sindikatoj jam aktivis. Sed eble vi povos fari sugeston, kiun la aliaj ne pripensis.

Verŝajne tamen ankaŭ estos necese, meti anoncojn en kelkaj grandaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Sekcioj povos ricevi subvencion de la propaganda kaso, se ili bezonas tion. La asocia estraro metos anoncojn verŝajne en kelkaj gazetoj.

Kelkaj homoj diras : al kio tio utilas? Sed se vi havas ankoraŭ iom da verda vivo en via



koro, vi ne estas tia: vi faras kion vi opinias necesa kaj ĝusta. Ĉu oni timu la rimarkojn de la homoj, kiuj primokas vin? Mi ĉiam pensas: la stultuloj ne scias pri kio ili parolas kaj mi ja mem konstatis la faktojn pri Esperanto. Oni eĉ povas fieri esti Esperantisto kaj ankaŭ montri tion. Mi ne interparolas per alies lango, ni ne dependas kiel beboj de la umbilika ŝnuro por kompreni alilingvanon. Ni ne estas devigataj honori alies lingvon kaj kulturon kaj nei tiujn de aliaj popoloj, inkluzive la propran. Ni estas egalrajtaj.

Kaj alia grava faktoro, kiu devas instigi vin ĉiuj al pli da aktiveco ol iam antaŭe, estas la fakto, ke neniam antaŭe la amaskomunikiloj en Nederlando dediĉis TIOM DA ATENTO AL ESPERANTO OL EN LA PASINTA DUONJARO! Povas esti ke pri tio kulpas ne nur la konstanta frapado de kelkaj aktivuloj, sed ankaŭ ĝenerala konsciigo pri lingvaj problemoj, lingva diskriminacio kaj kultura imperiismo. La tereno estas preparita kaj estas en bona stato por esti semata. Estas al ni semi NUN.

Eble vi diras, ke vi ne plu povas eliri surstraten aŭ ne havas tempon. Nu, kvankam pri tiu senkulpigo de tempomanko mi ne tro fidus, mi tamen povas sugesti al vi alian manieron por subteni la propagandan aktivecon, kiun nia asocio disvolvas en la nuna sezono. Ja estas la ebleco ĝirpagi monon al konto 512970 de Afd. Onderwijs, por la Propaganda kaso. Adreso: Leidsevaart 52 Vogelenzang. En niaj raportoj vi povas legi ke viaj kontribuoj ne estos metataj en ŝtrupon aŭ disĵetataj al la porkoj. Ni zorge utiligos vian monon por diskonigi la ekzistadon kaj funkciadon de la internacia lingvo Esperanto, kiu sola povas esti por ni la ilo, per kiu ni povas rekte, egalrajte komuniki kun alilingvanoj kaj kiu ebligas al ni plejeble riĉigi nian vivon.

Ek al la propaganda laboro! Pasintaj kampanjoj jam donis esperigajn rezultatojn. Sed "ESPERANTO-80" estu la komenco de grava antaŭenpuŝo!

La kasistino de FLE komunikas:

Kun ĝojo mi povas informi vin, ke la asocia kaso riĉiĝis per jenaj donacoj:

6- 3-'79a:	k.do H.A. van Dijk, Hengelo	f 25,00
17- 3-'79a	k.do S. Schilperoord, Amsterdam	f 39,20

FAULHABER-FONDAĴO:

Ankaŭ por la kaso de Faulhaber-Fondaĵo mi ricevis donacojn:

28 - 2 - '79a:	k.do A. Lakemond, Apeldoorn	f 10,00
17 - 3	k.do F.B.E. ten Hagen, Amsterdam	f 17,70
17 - 4	k.dino W. Klijn-Bekkink, Amsterdam	f 10,00
17 - 4	k.dino W.A. Postma - van Albada, Amersfoort	10,00
20 - 4	k.do A.L. Allis, Purmerend	f 10,00
3 - 5	k.dino A. Hagen-ten Have, Apeldoorn	f 10,00
4 - 5	k.do W.P. Siglé, Amsterdam	f 8,20
7 - 5	k.do J. Luiten, den Haag	f 5,00
11 - 5	k.dino J. H. ter Braak, Zwolle	f 10,00
14 - 5	k.dino M.H. Richter- de Groot, Zwolle	f 10,00
18 - 5	k.do B. de Wit, Vogelenzang	f 25,00
30 - 5	k.do J.W. Saaltink, Arnhem	f 5,00
1 - 6	M.J.V., Amsterdam	f100,00
1 - 6	k.do R. Moerbeek, Rotterdam	f 25,00
8 - 6	k.dino J.R. van Eynde-Deneef, Antwerpen	f 10,00
2 - 7	k.do J.G. Hartgers, Ede	f 5,00
11 - 7	k.dino E. Allis- Sadlon, Purmerend	f 10,00
25 - 7	k.dino J.J. Schouten, Haarlem	f 50,00
7 - 8	k.dino P. de Boer- Maat, Amersfoort	f 20,00

Mian koran dankon al ĉiuj donacintoj!! :

A.M. Demmendaal-op den Brouw, kasistino  
ĝirkonto 331133 nome de Bond van Arbeiders-Esperantisten FLE, Rotterdam.

GRAVAJ DATOJ:

Antaŭ la 1-a de novembro vi ensendu (ĉe la sek.riino) la raportojn de sekcioj, distriktoj, k.t.p. Proponojn antaŭ la mezo de decembro, Amendojn antaŭ la 1-a de februaro 1980a. Konsilantarkunveno : 9a de februaro, Rotterdam. Kongreso : 22a-23a de marto, Gouda.



Daŭrigo de la protokolo pri la 58a FLE-kongreso, okazinta la 17an kaj 18an de marto en Koos Vorrinkuis, Lage Vuursche.

Dimanĉmatene frue okazas SAT-kunveno, en kiu k.do Halliday el Britio informas pri la okazontaj kongresaj aranĝoj. Ankaŭ malfacilaĵoj rilate la sendadon de Sennaciulo al kelkaj orient-eŭropaj landoj estas preparolataj.

#### DUA LABORKUNSIDO.

Komence salutas la kongreson ankoraŭ Repke Hollema, nome de Fryske Foriening foar in Federael Europa. Li eklermas Esperanton, ĉar li opinias ke nur tiu lingvo povas garantii, ke ĉiu povas konservi siajn lingvon kaj kulturon. La asocio eldonas bultenon, Federalistyk Nijs.

#### PROPOMOJ.

La unua propono de sekcio Hago estas organizi komunan kongreson, en la sama kongresejo, sed aparte, kun aliaj nederlandaj Esperanto-asocioj. La estraro en KEG jam klarigis kial oni siatempe rezignis pri la partopreno en la kongreso de Beekbergen.

Intertempe la kongresdecido de Haarlem ebligas nun komunan kongreson kaj FLE jam invitis por komuna kongreso en 1980a.

NEA (LEEN) negative respondis, ĉar oni ne volas konkurenci la eŭropan kongreson venontjare. Teorie FLE povus kongresi kun MK, KUNE kaj aliaj, sen NEA, sed tiuj asocioj tute ne reagis. En 1981a komuna kongreso, sub aŭspicioj de FEN, povos okazi.

La dua propono de sekcio Hago, ne plu repagi la kongreskostojn al konsilantoj, pro tio ke ili jam ricevas la kostojn de la konsilantara kunveno, estis unue pozitive juĝata fare de la asocia estraro, sed k.dino Demmendaal (kasistino) nun respondas, ke la estraro ŝanĝis sian opinion. La konsilantoj povas esti konsiderataj kiel plivastigita estraro kaj ilia ĉeesto en la kongreso estas morale necesa. Cetere ili povos ankaŭ ĉeesti la kongreson kiel delegito de distrikto kaj tio solvos nenion. Plie, ankaŭ al la konsilantoj aplikiĝas la decido de parta repago el la pasinta kongreso.

Laŭ sugesto de k.do de Vries, sekcio Hago reprenas sian proponon.

La tria propono, de la asocia estraro, samkiel la ceteraj, temas pri la rajtoj de ĝeneralaj membroj. En la membro-atesto, paĝo 13, 14a kaj 15a linioj, la kongreso akceptas la forstrekon de la dua parto de la frazo, tiel ke nun restas :

"Ieder algemeen lid, in het congres aanwezig, brengt één stem uit".

Plie, la teksto sur paĝo 13, 10a linio de malsupre, estas ŝanĝata en :

"Voorstellen voor het congres kunnen de leden bij hun afdelingen indienen. Zij hebben gelegenheid hun voorstellen in de betreffende afdeling toe te lichten. De voorstellen moeten na behandeling in de afdelingsvergadering uiterlijk twee maanden vóór het congres bij de bondssecretaris worden ingediend.

Voorstellen van algemene leden dienen door tenminste 5 algemene leden, in totaal, te worden ondersteund en uiterlijk 2 maanden voor het congres bij de bondssecretaris te worden ingediend.

De beschrijvingsbrief....k.t.p."

K.dino Minholts kaj k.do de Vries sugestas pridiskutigi la proponojn de ĝeneralaj membroj en la distriktaj kunvenoj. Sed la prezidanto kaj k.dino de Bruin ne opinias oportune, menciion en la regularo mem. La proponita teksto estas akceptata.

Post la paŭzo okazas la honorigo de k.do Liedermooij, kiu estas 50 jarojn membro de F.L.E. Li, kiu aliĝis en 1928a en Amsterdamo, ricevas la honoran insignon el la manoj de k.do ten Hagen. K.do Liedermooij akcentas en sia dankvorto, ke ni restu idealismaj kaj fidelaj al nia idealo. Ni daŭre strebu al la enkonduko de la internacia lingvo en la internacia komunikado, ekz.e en la eŭropa komunumo. Iam la homoj ja ne plu estos tiel stultaj, ni esperu, sed ni devos aktivi por tio, kunlabore kun aliaj Esperanto-asocioj.

Alia jubileanto, kdo van Dijk el Hengelo, ne povas ĉeesti pro malsano. Post tiuj ĉi honorigoj, la kongreso pritraktas la aliajn proponojn de la asocia estraro, kiuj temas pri Instrua Servo kaj Faulhaber-Fondaĵo.

Ili tekstas jene:



daŭrigo de la protokolo

"Artikel 14 a. Instrua Servo. (Afdeling Onderwijs).

De Afdeling Onderwijs heeft tot taak:

- a) het verstrekken van voorlichtingsmateriaal over Esperanto in de ruimste zin;
- b) het uitgeven van lesmateriaal en het verzorgen van onderwijs, in het bijzonder van schriftelijke kursussen in de internationale taal.

De Afdeling Onderwijs F.L.E. is als instelling van schriftelijk onderwijs erkend door de Minister van Onderwijs en Wetenschappen, bij beschikking van 13 febr. 1975, BVO/SFO-129.706.

Deze erkenning houdt in, dat het materiaal en de dienstverlening aan bepaalde eisen moeten voldoen. De correctoren, die deel uitmaken van het docentencorps, moeten worden goedgekeurd door het Ministerie van Onderwijs en Wetenschappen. De schriftelijke kursussen van de Instrua Servo zijn afgestemd op de Esperanto-examens, zoals die worden afgenomen door de Algemene Nederlandse Esperanto Examen Commissie.

Zo mogelijk wordt het schriftelijk onderwijs aan de kursisten ondersteund door mondelinge bijeenkomsten.

De Instrua Servo geeft voorts advies aan afdelingen en algemene leden bij de organisatie van mondelinge kursussen.

De leiding van de Instrua Servo berust bij een aantal personen, waarvan in ieder geval één in het bondsbestuur zitting heeft en verantwoording schuldig is aan de bondsraad en het congres. De andere medewerkers van de Instrua Servo worden in onderling overleg door het bondsbestuur benoemd. De verslagen van de Instrua Servo worden gepubliceerd in het bondsorgaan. "

La kongreso unuanime akceptas la proponon.

La teksto pri Faulhaber-Fondaĵo, nun malantaŭe en la membro-atesto, estos anstataŭigata de jena teksto, ligita al artikolo 14 pri la Libro-Servo kaj artikolo 14 a pri Instrua Servo :

"Artikel 14 b. Faulhaber-Fondaĵo. (Faulhaber-Fonds).

Het Faulhaber-Fonds heeft tot taak :

- a) het organiseren van kulturele bijeenkomsten;
- b) het bevorderen van de taalkennis van de leden.

De leiding van het Faulhaber-Fondaĵo berust bij een aantal personen. De penningmeester van de bond is tevens penningmeester van het Faulhaber-Fondaĵo. De andere medewerkers van het Faulhaber-Fondaĵo worden in onderling overleg door het bondsbestuur benoemd. Deze medewerkers zijn verantwoording verschuldigd aan de bondsraad en het congres.

De verslagen van het Faulhaber-Fondaĵo worden gepubliceerd in het bondsorgaan. De financiële middelen van het fonds bestaan uit giften en een door de bond geschonken bedrag. (Rekonstrua Kaso, f 692,80 ). "

Akceptata, kun 1 sindeteno.

Traktinte la proponojn, la prezidanto sciigas, ke oni ĵus telefone informis pri la morto de k.do van Kouwen, konata membro, precipe en fervojistaj rondoj.

La morto de k.do Faulhaber, nia honora prezidanto, verŝajne kortuŝis multajn, kiuj eksciis pri tio. Kelkaj el vi ricevis funebran karton, aliaj alimaniere eksciis. La ĉefestraro metis anoncon en Algemeen Dagblad kaj Het Parool menciis la morton de Faulhaber pro gazetarkomuniko de k.do ten Hagen.

Proksimume 50 geesperantistoj ĉeestis la cindrignon en Amsterdamo, kiu estis tre simpla ceremonio, sen floroj kaj paroladoj. La fino de la ceremonio estis ĉeĥa kanto pri amo kaj forpaso.

La prezidanto jam verkis artikoleon por KEG, kiu aperos post monato. En ĝi li klopodis skizi la meritojn de Faulhaber, certe tro malmultajn li menciis, sed oni ne povas ĉion mencii.

Post tiu ĉi memorigo, k.do de Vries alparolas la prezidanton, kiu hodiaŭ funkcios por la lasta fojo. Li skizas kiom k.do ten Hagen faris en sia kariero en FLE dum pli ol 40 jaroj. Li komencis en '33a kiel dua sekr.io de sekcio Amsterdam 5a. En la sama jaro li jam fariĝis unua sekr.io de la sekcio kaj poste de la amsterdama distrikto.

Ankaŭ en la kantaĵo "La Nova Tempo", en la muzikgrupeto "La Verdaj Steloj", li aktivis. Kun aliaj li en 1946a iniciatis la starigon de Internacia Grafikista Esperantista Ligo, ISEL. Dum multaj kongresoj li protokolis, li recenzis librojn, faris paroladojn en SAT-



## daŭrigo de la protokolo

rondoj, kunredaktis "Laborista Esperantisto" kaj fine en 1958a fariĝis redaktoro kaj ĉef-estrarano. Li postsekvis k.don van Haren en 1960a kiel sekr.io, ĝis 1968a. Sed jam en 1973a li revenis kiel prezidanto; krome teknika redaktoro de KEG li iom poste fariĝis. Nome de FLE k.do de Vries elkore dankas lin pro lia multa aktiveco, sindonemo por Esperanto kaj F.L.E.

De k.dino A. Demmendaal la kortuŝita prezidanto ricevas la libron "Donkiĥoto" kiel pruvo de nia danko. Poste k.do de Vries ankaŭ honorigas k.dinon ten Hagen, kiu ĉiumaniere subtenis, stimulis kaj toleris la aktivaĵojn de sia edzo, inspirita de la sama idealismo. Ankaŭ al ŝi F.L.E. elkore dankas kaj k.do Kwantes donacas al ŝi florojn por substreki tion. K.dino ten Hagen memorigas ke ŝi antaŭ 40 jaroj lernis Esperanton ĉe k.do Prent. Tiu nun povas vidi, kia estas la rezultato. K.do ten Hagen dankas por la libro kaj la vortoj. Li tamen ne malaperos, sed daŭre laboros por Esperanto.

Post la tagmanĝo, la prezidanto dankas al la k.dinoj T. Mol, J.M. van Riemsdijk-Goossens kaj A. Minholts-Balkema, kiuj deĵoris dum longa tempo kaj tre fidele en resp. la Ekzamena Komitato, la Instrua Servo (kiel sekr.iino) kaj kiel konsilanto. Ĉiuj ricevas memorajon. K.do de Wit ankaŭ speciale dankas k.dinon van Riemsdijk por la bona kunlaboro en la Instrua Servo, kvankam ŝi ankoraŭ restos en ĝi kiel korektantino. K.dino van Riemsdijk sciigas, ke ŝi ĉiam kun granda plezuro faris tiun laboron.

## ESTRARELEKTO.

K.dino de Bruin enkondukas la elekton de nova prez.o. En la pasinta kongreso ŝi diris, ke ŝi intencas kandidatiĝi por tiu funkcio, sed familiaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis, tiel ke ŝi nun ne plu volas plenumi tiun funkcion. Oni serĉis alian personon kaj trovis k.don Landwehr el Haarlem preta. Sed post la konsilantara kunveno k.do Landwehr ne sentis sin trankvila pro sia estonta funkcio. La estraro troviĝis denove en embaraso. Tiam la estraro post interkonsiliĝo kun k.do Landwehr solvis la aferon, proponante k.don de Wit kiel prezidanton por unu jaro kaj k.don Landwehr kiel duan prezidanton.

En "Nieuwsbrief" ŝi erare forgesis mencii k.don Landwehr kiel kandidaton por la funkcio de dua prezidanto, pro kio ŝi pardonpetas.

K.dino van Riemsdijk, sekcio Amsterdam 5a, post tiuj vortoj, esprimas sian malkontenton pri la irado de la afero. Kiam la sekcio aŭdis pri la skrupuloj de k.do Landwehr, ĝi decidis sendi leteron al la estraro kaj proponis alian k.don. La sekcio ricevis respondon de la sekr.iino, ke la propono estas ensendita tro malfrue.

Nun ke la afero estas solvita en ĉi tiu maniero, Amsterdam 5a reprenas sian proponon.

K.do de Wit estas sekve elektata kiel prezidanto por 1 jaro kaj k.do Landwehr poste estas elektata por 3 jaroj kiel asesoro, dua prezidanto. K.dino de Bruin-Kooij estas reelektata kiel membro-administrantino. Ŝi finis la restintan deĵortempon de k.dino A. Demmendaal, kiun ŝi postsekvis.

Post interparolado kun k.do ten Hagen, k.dino de Bruin sin deklaris preta ankaŭ transpreni la funkcion de redaktoro de la FLE-paĝoj en KEG. La kongreso akceptas tiun ŝanĝon de redaktoro.

En la kaskontrolkomitato k.do Lindhout postsekvas k.don Oosterwijk. La aliaj membroj estas k.dinoj van Riemsdijk kaj Eout-Veen.

Por Faulhaber-Fondaĵo oni nun trovis du k.dinojn pretaj transpreni la laboron de k.dino Smit. Temas pri la k.dinoj A. ter Braak el Zwolle kaj Paetzel el Almelo. La duopo jam okupiĝos pri la aranĝado de la venonta semajnfino, kiu okazos la 24an kaj 25an de novembro en Koos Vorrinkhuis. Kun aplaŭdo ankaŭ ilia elekto estas aprobata de la kongreso.

## VENONTA KONGRESURBO.

Post iom da palpado, oni kontaktis kun k.do Terlouw el Gouderak. Li estas kun la aliaj membroj de sekcio Gouda preta helpi organizi kongreson en Gouda. La kongreso nuna priĉipe decidas por dutaga kongreso. La tranoktado ne povos okazi en unu konstruaĵo. K.dino A. Demmendaal sciigas, ke la kaso povos repagi 65 gld. al delegitoj kaj konsilantoj.

## LABORGRUPOJ.

La ĵus elektita nova prezidanto jam verkis en la kongreslibro enkondukon al ĉi tiu diskutemo. Laborgrupoj povos funkcii apud la estraro kaj havos pli malpli daŭran karakteron. Oni pensas pri la starigo de laborgrupoj pri informado (radio/TV/gazetaro), politikaj par-



tioj kaj sindikatoj. Aperis ekz.e pri la nuna kongreso anoncoj en la partigazetoj de PPR kaj PSP, ankaŭ NOS menciis la forumon en elsendo pri Eŭropo. Tiaj aktivaĵoj estu farataj de grupo, kiu specialigaĝas pri tiaj aferoj. Kelkaj homoj ne volas kaj povas funkcii en estraro, sed tamen volas aktivi iel. Jen ebleco por tiuj gek.doj. La estraro estos reprezentata en tiuj laborgrupoj, tiel ke oni ne perdos la superrigardon.

K.dino L. Demmendaal aldone klarigas kion ŝi atendas de laborgrupoj. El la enketilo oni povas ĉerpi kandidatojn por la grupoj. Oni povas ekz.e organizi petadon ĉe la radio, ĉu en specialaj programoj, ĉu en diskoprogramoj. Sindikatoj bone rigardu en siaj gazetoj, kiam oni parolas pri internacia agado kaj solidareco, ĉu oni povas ligi tion al Esperanto kaj tiam verki leteron. Ankaŭ al la politikaj partioj ni devas montri ke ni ekzistas. Por la sindikata laborgrupo ŝi havas la nomojn de k.do Landwehr kaj k.dino Oosterling. Por radio/TV : k.dino Dee kaj k.do Terlouw. Por politikaj partioj : k.dino de Bruin, k.do Terlouw, k.do Verheulen kaj k.do Liedermooij. Certe pli da homoj povos aktivi, ili kontaktu la sekr.iion.

Kdino Kooij-van Holst volas ĉe la fino de la kongreso esprimi sian impreson de la kongreso. Unue ŝi volas kritiki la troan krokodiladon, kiu precipe ĝenas al tiuj, kiuj loĝas en malproksimaj, disaj lokoj kaj foje volas praktiki la lingvon. Se ni volas konvinki la mondon pri la uzebleco de Esperanto, ni uzu ĝin. Kaj la etoso estis ankaŭ ne kiel kutima: estis kvazaŭ distanco inter estraro kaj kongresanoj. (protestoj el la salono). Se oni legas la jarraportojn, oni miras ke tiel malmultaj homoj povas fari tiom. Ni ne forgesu ke ni havas duan belan standon. Neniu parolis pri ĝi ĝis nun.

La propagandmetodoj ŝanĝiĝis: antaŭe oni iris surstraten kun ĉaretoj kaj disdonis flugfoliojn. Nun oni faras tion alimaniere. Estas manko de meza generacio en nia asocio. La juna generacio bezonas la helpon de la pli maljuna. Oni adaptigu al la novaj manieroj de laboro kaj agado, ĉar nia asocio bezonas novajn junajn aktivulojn. Kaj tiuj, kiuj aktivigas bezonas ankaŭ foje dankon kaj kuraĝigon.

La prezidanto dankas ŝin por tiuj vortoj, kiuj certe respegulas la sentojn en la kongreso. Restas al li eldiri danki la kuirgrupon, kiu konsistis el ge-van Hulst, ge-Landwehr kaj la k.dinoj Menges kaj Ten Hagen. Ankaŭ ne speciale menciitaj gek.doj kunlaboris por sukcesiĝi nian kongreson, por kio ili estu dankataj. Donacoj kaj aplaŭdo de la kongreso sekvas. K.doj Prent kaj Masson poste dankas la kongresanojn por la plezura okazintaĵo kaj adiaŭas ĝis venonta revido.

Finfine k.do ten Hagen fermas la kongreson, dankinte ankaŭ la domgardiston. Plenoĉe oni kantas "Fratoj al Sun'!" kaj poste laŭ peto de multaj, laŭ la melodio de "Al la batalantoj" jenan strofon, kiu faris k.do Geurtz :

"Faulhaber, vi, por la homaro

La tutan vivon donis vi.

Pri Esperanto via faro

Ja estis vi apog' por ni.

Per fruktedona la verkaro

Pri nia Lingvo Internaci'

Profitas ni pro via faro

Eterne rememoras vin."

Post tiu kanto oni disiris. Agrablaj rememoroj miksiĝis kun malĝojaj. Poste nin skuis la morto de k.dino A. Dubois de Zeeuw, modesta, vivoplena k.dino, kiu hejmenirante akcidentiĝis. Ili restos en nia memoro kaj estu por ni instigo daŭrigi la batalon por pli homeca mondo, en kiu Esperanto estos universala interkomprenilo.

Kun danko al la protokolintino, k.dino ter Braak.

oooooooooooooooooooo

AFIŝOJ.

Ĉi-kune vi ricevas afiŝon, kiun la asocio senpage disponigas al vi. La koloroj estas helflavaj kun nigraj literoj kaj verda stelo aŭ helverda kun nigra surpriso. Se vi ne volas uzi ĝin, donu ĝin al alia k.d(in)o en via ĉirkaŭaĵo; vi povas ankaŭ pendigi ĝin en bibliotekoj kaj renkontiĝocentroj. Kaj laste: vi povas resendi ĝin al la Instrua Servo, se vi ne uzos ĝin. Se kontraŭe vi deziras havi pli da ekzempleroj, vi povos mendi ĉe I.S. Por ne-membroj de FLE ĝi estas akirebla por 1 gld, inkl. afrankon.



FLE - MALLONGE

En ĉi tiu rubriko ni estas devigataj anonci pri okazintaĵoj, kiuj jam delonge okazis, sed kiuj ne povis esti publikigataj en KEG. Do, tiel "mallonge" ne estos...:

- +La 6an de aprilo la stando de la Nord-Holanda distrikto staris en Heemstede, en la Pedagogia Akademio, kie okazis manifestacio sub la temo "Infano kaj medio". Ĉiaj primediaj grupoj estis reprezentitaj kaj k.dinoj Joosten kaj van Hulst deĵoris ĉe la stando. Estis sufiĉe da interesiĝo ĉe la vizitantoj, kelkaj diskutoj sin disvolvis kaj kompreneble oni ŝatis la Esperanto-eldonon de la glumarko kontraŭ nuklea energio. Dankon al niaj k.dinoj, kiuj estis tre laĉaj kaj malvarmumis poste. Ankaŭ k.doj Klein kaj van Hulst meritas dankon pro la helpo ĉe la transportado de la stando.
- +En Amersfoort niaj anoj ankaŭ partoprenis en manifestacio per stando..
- +En la PPR-kongreso en Nijmegen, kiu okazis la 21an de aprilo, FLE estis reprezentita per tablo kun informmaterialo. Por la kongreso estis farita speciala eldonaĵo, kiu konsistis el la parolado de Leo Jansen dum la FLE-kongreso. Ĉar la teksto estis dulingva, la kongresanoj havis la eblecon kompari la nederlandan kun la Esperanto-teksto. Fine de la eldonaĵo estis alvoko fariĝi simpatianta membro de FLE. Deĵoris ĉe la tablo k.do de Wit.
- +Multaj simpatiantaj membroj jam rekotizis kaj regule sin anoncas novaj, tiel ke entute la nombro da simpatiantaj membroj denove kreskis kompare al la pasinta jaro. Ili ricevas kvarfoje jare la "Esperanto-Nieuwsbrief" kaj la minimuma kotizo estas 5 gld. (ĝiro 331133 nome de Bond van Arbeiders-Esperantisten FLE, Rotterdam). Interesigu viajn gekonatojn!
- +Je la 21a de aprilo VARA elsendis en la rubriko "De VARA feliciteert" bondezirojn al la administranto de Instrua Servo, kiun kursano volis esprimi pere de Esperanto-kanto. Anstataŭe oni elsendis aligatoraĵon. Sed nun, karaj gek.doj oni en Hilversum ne plu trovas pretekston rifuzi al vi Esperanto-kanton, ĉar NOS-diskoteko ricevis de FLE diskojn Esperantlingvajn. La titolojn kaj la titolojn de la kantoj vi trovas en ĉi tiu eldonaĵo.
- +Por la PvdA-kongreso, fine de aprilo, ni sukcesis akiri permeson meti la standon de la Nord-Holanda distrikto. Kvankam la loko ne estis tre oportuna, tamen kelkaj partianoj venis por aĉeti ion aŭ por fari babiladojn kun la deĵorantoj, k.doj ten Hagen, Schilperoord kaj de Wit. La gek.doj van Hulst kaj k.do Verbruggen helpis en la transportado.
- +Por la rubriko: "Opinio de Legantoj" ni sendis artikoletojn al Haarlems Dagblad kaj al Tubantia reage al artikolo pri la funkciado de la Eŭroparlamento. En ĝi ni skizis la sintenon de diversaj politikaj partioj kaj politikistoj al la lingva problemo en E.K., ankaŭ de tiuj, kiuj partoprenis nian kongreson.
- +La asocio disponas pri nova leterpapero, sufiĉe moderna kaj belaspekta.
- +Ni bonvenigas novajn anojn en Rotterdam, Oldenzaal, Wijdenes, Apeldoorn kaj Scheemda.
- +En la semajna gazeto "De Groene Amsterdammer", la 4-an de julio aperis "Opland-desegnaĵo" farita de unu el la legantoj. Temis pri iu B. de Wit el Vogelenzang, kiu kaŝe reklamis por Esperanto, figurigante la glumarkon kontraŭ atomenergio, en la Esperanto-versio, en la desegnaĵo. (Fakte do temis pri konkurso).
- +La sama ulo kulpis pri la aperigo en la gazeto "Intermediar" de la 20-a de julio de artikoleto, reage al artikolo pri la rajto je komunikado, en kiu la aŭtoro tute pretervidis la lingvan problemaron. Pri tio nete atentigas la aŭtoro de la ensendita letero, kiun la gazeto entute presigis. Nur fine estas klare pri kio temas: pri Esperanto.
- +Nia k.do Kuypers el Rotterdam sendis salutkarton el la SAT-kongreso en Swanwick al "Het Vrije Volk". Oni presigis la karton, ambaŭ flankojn kun la komento de la sendinto.
- +La Gvidrezolucio de la 52-a SAT-kongreso estis en la semajnfino de la 22-a de julio multobligata kaj forsendata al pli ol 70 gazetoj kaj instancoj.
- +Nia k.dino Inge de Bruin-Kooij scias bone plani naskiĝojn: ĵus kiam la poŝto pri la gvidrezolucio estis forsendata, ŝi ekhavis trian infanon, knabinon, kiu nomiĝas Karla Gerda. La knabineto kaj la patrino bone fartas. Al ĉiuj familianoj ni tre kore gratulas okaze de ĉi tiu naskiĝo!
- +La malgranda glumarko de F.L.E. "Esperanto? Ja, Graag!" nun ankaŭ havas grandan fratinon, nome glumarkon de 12 cm, kun nigraj literoj kaj helverda terglobo + stelo. La franca eldono de la malgranda glumarko jam realiĝis, la germana eldono baldaŭ sekvos. Ankaŭ la bul-







## LABORGRUPOJ.

Dum la kongreso la estraro proponis starigon de tri laborgrupoj, nome por sindikatoj, politikaj partioj kaj radio/televido/gazetaro, kiuj pripensos la propagandoblecojn en la koncernaj medioj.

Dum kaj post la kongreso diversaj gek.doj konsentis kunlabori en iu aŭ alia laborgrupo. Ankaŭ jam venis informpeto de kamaradino, kiu deziras proponi certan agadon ĉe la radio en sia sekcio.

La laborgrupo por sindikatoj konsistas nun el : k.do G.C. Landwehr, Mw Guineastraat 50, 2022 PB Haarlem, tel 023-379315, (li kunordigas la agadon) kaj k.dino J. Oosterling el Rotterdam. Aliaj kunlaborantoj estas ankoraŭ bonvenaj.

La laborgrupo pri politikaj partioj konsistas el : K.dino Inge de Bruin-Kooij, Doniastate 9 7608 XJ Almelo, tel. 05490-63780. Ŝi kunordigas la agadon. Laŭ alfabeto plie : Hans Adriaanse (Maastricht), gek.doj Hafkenscheid (Groningen), Bas Terlouw (Gouderak) kaj k.do Verheul el Apeldoorn.

La laborgrupo pri radio/televido, gazetaro konsistas el : Loes Demmendaal, kunordigantino, Bethlehemstraat 23 e, 3061 GA Rotterdam, tel. 010-124075 kaj k.dino Dee (Hilversum), k.do Klein (Den Helder), k.do Bas Terlouw, (Gouderak), Franklin van Zoest (Baarn) kaj B. de Wit. Vogelenzang.

Tiuj, kiuj ŝatas partopreni en la laborgrupoj aŭ havas sugestojn b.v. turni sin al la koncernaj kunordigantoj. Ek al la propaganda laboro!

Loes Demmendaal.

## LA KONGRESO de SAT-AMIKARO, PASKO 1979a, AVINJONO.

La kongreso de SAT-Amikaro okazis la 14-an, 15-an kaj 16-an de aprilo en la antaŭa papa urbo Avignon, Sud-Francio. La kongresejo : mezgrada lernejo. Nombro da partoprenantoj: 150 preskaŭ (aliĝis pli ol 150), inter ili sufiĉe da gejunuloj kaj novuloj.

La etoso en la kongreso baldaŭ fariĝis tia, kia oni povas atendi en SAT-Amikara kongreso. La oficiala malfermo okazis dimanĉmatene en la ĉeesto de la urbestro de la kongresurbo. Kompreneble estis dirataj la kutimaj salutvortoj: nome de F.L.E. k.do ten Hagen salutis, nome de SATEB k.dino Melton. La eksterfranciaj SAT-Amikaranoj ankaŭ montris sian ĉeeston en la kongreso kaj salutis nome de belgaj kaj svisaj gek.doj.

Ne estis specialaj temoj dum la traktado de la jarraportoj, kiuj bezonis apartan atenton. Iom ĵaluza mi estis pri la gazeto, kiun niaj gek.doj havas. Ne estas problemoj pri ĝustatempa publikigo, ĝi aspektas bona kaj orda. La legantoj ĉiun jaron povas per referendumo esprimi sin pri la enhavo kaj formo de la gazeto. (Pri tio ja ni ne parolu...)

La propaganda aktiveco, kiun gvidas k.do H. Masson, ĝuste en tiu unua kongresa tago havis neatenditan rezulton: kvankam k.do Masson jam estis skribinta plurfoje al "Le Monde", tiu gazeto nur nun aperigis kontribuon de li, sub la titolo : "Por tutmonda komunikado". Vere gratulojn pro tiu sukceso. La gazetaro fakte entute estis tre pozitiva al la kongreso. Aperis tri artikoloj en regionaj gazetoj.

En la dua kongresa tago ni partoprenis en laborgrupoj, unu pri ekologiaj problemoj, alia pri Esperanto-informado, al kiuj la ĉeestantoj aktive partoprenis. Tio estis novaĵo en la kongresoj de SAT-Amikaro. Ceteraj eroj de la kongresoprogramo, kiuj estas nepre menciindaj, estis prelegoj de k.do Levreaud pri sia biciklovojaĝo ekologia de Parizo al Varsovio, de k.do M. Ducgoninaz pri socilingvistikaj aspektoj de Esperanto kaj de k.do Beau pri la rezistmovdao de kamparanoj kontraŭ la plivastigo de armea ekzerctereno en Larzac, Sud-Francio. Larzac estas famkonata vorto en Francio; la vorto nur antaŭ nelonge ankaŭ iom fariĝis en Nederlando pro gazetartikoloj. (En Sennaciulo jam antaŭ iom da jaroj aperis informa artikolo pri Larzac).

Kompreneble estis ankaŭ distraĵoj: sabatvespere fervojistaj dancistoj montris baledajn kaj folklorajn dancojn, ter lerte. La Tuttaga Ekskurso, marde, kondukis nin al la belega regiono de Fontaine de Vaucluse, kie ni estis akceptataj fare de la urbestro kaj regalata per ege bongusta vino de la regiono (neevitebla en Sud-Francio). Kvankam la suno brilis, estis malvarme ekstere, ĉar blovis Mistralo. Tamen ni plene ĝuis la naturbelajojn: senfinaj fruktarbaroj florantaj, vitokampoj kaj cipresoj en pejzaĝo, kiu ankoraŭ multloke similas tiun, kiun van Gogh iam pentris.

Por la unua fojo ankaŭ okazis postkongreseto, kun proksimume 30 gepartoprenantoj. Oni multe ekskursis en la ĉirkaŭaĵoj de Avignon. Nia gvidanto estis k.do André Gente kaj li montris al ni multajn belajojn, ĝuindaĵojn kaj interesaĵojn. La restaĵoj el la Romana epoko, kelkloke tre bone konservitaj, estis kompreneble admirataj, sed ankaŭ vizito al vinkulti-



visto/Esperantisto estis sur la programo kaj vizito al "katedralo" en ŝtonminejo, kie oni prezentis tre specialajn lumbildojn. Certe oni multe ĝuis tiun neformalan turismadon en Esperantista medio.

En la adiaŭa vespero niaj gek.doj van Hulst planis surprizon: por festi sian 40-jaran geedziĝon, ili volis en Esperanto-medio memorigi tiun datrevenon kaj ...kiel ! Ni estis regalataj kiel princoj. Multaj ilin gratulis, i.a. la prezidantoj de SAT-Amikaro kaj FLE. Kaj per tiu festo finiĝis ankaŭ la postkongreseto.

Venontan jaron la SAT-amikara kongreso okazos dum Pasko en Boulogne Sur Mer, nomo, kiu havas specialan sonon en la Esperanto-tradicio!

raportis B. de Wit.

LA 52-a SAT-KONGRESO, SWANWICK, 13a ĝis la 20-a de julio.

La 52-an SAT-kongreson en Swanwick, Britio, Derbyshire, partoprenis 310 gek.doj el 16 landoj.

Por tiuj, kiuj ĉeestis antaŭe kongreson aŭ jarkonferencon en "The Hayes Conference Centre" estas superflue diri, ke restado en tiu ideala konferencejo signifas bone manĝi, trinki, dormi, promeni kaj ripozi. Ankaŭ multaj novaj vizitantoj de la konferencejo spertis tion kaj havas agrablajn rememorojn pri la libertempo tie. Kvankam laŭdire eĉ kelkaj kongresanoj ne estis tute kontentaj..

En la kongressemajno oni povis multon babili, pritrakti seriozajn aferojn en laborkunsidoj kaj frakciaj kunvenoj, distri sin kaj ekskursi al diversaj celoj.



## La Piratoj de Penzanco

Plej agrablan impreson faris la prezentado de la tipe angla farsa opero "La piratoj de Penzanco", kiun membroj de la Londona klubo kaj kelkaj ne-Esperantistaj vokalistoj prizorgis. En glata traduko de R. Rossetti klare esprimiĝis la humuro de la angla originalo. En la kongreso oni jam povis aĉeti libreton kaj kasedon de la opero.

Kiel kutime, la oficiala malfermo okazis en kamara-deca etoso, trafe karakterizita de k.do Rapley kiel "senkravata". Minista blovorkestro zorgis pri la "solena elemento".

Dum la traktado de la jarraportoj estis viglaj diskutoj pri i.a. la redaktado kaj aspekto de Sennaciulo. La gvidrezolucio estas produkto de multaj intervenoj; ĝi estas sufiĉe aktuala kaj celdirektita, kio estas bona, se oni volas utiligi ĝin por ekstera uzado. Aliaj pli malpli seriozaj partoj de la kongresprogramo estis prelegoj. John Wells parolis pri : "Kial ne la an-

gla?", prelego, kiun oni povas rekomendi al ĉiuj malmolkapuloj, kiuj kredas ke la angla perfekte taŭgas por internacia komunikado. Aliaj temoj estis : "La astroj kaj Ni", de P. Louis kaj "La verdiĝo de la ursoj", de la kalifornia algologo Lewin. K.do Bartelmes enkondukis diskuton pri la signifo de Lanti por Esperanto okaze de la memorigo de la centjara datreveno de la naskiĝo de la fondinto de SAT.

Okazis la kutimaj kunvenoj frakciaj de pacistoj, liberecanoj, ekologiemuloj kaj la TANEF-kunveno. TANEF sukcesis produkti novan varbfolion, por kiu TAN subvenciis kaj oni ankaŭ produktis glumarkon. Necesas, ke pli da Esperantistoj abonu "La Migranto" kaj/aŭ aliĝu al la landa asocio de Naturamikoj.

Distraj elementoj estis plie (popol)dancado, tabloteniskonkurso, jogo, k.s. La vetero dum la tuta semajno estis sufiĉe agrabla, kvankam ne ege brila. Ekskursoj kondukis la kongresanojn al i.a. mezepoka katedralo, potbakfabriko malnovstila plus muzeo kaj al "La Verda Stelo" en Stoke-on-Trent, en la Esperanto-strato, kie oni povis en ĝusta etoso gustumi trinkaĵojn.

Kvankam la kongreso okazis en loko, kiu estas sufiĉe izolita de la ekstera mondo, OKK-sekr.iino k.dino E. Prent sukcesis tamen akiri radio-intervjuon de loka stacio.

Verŝajne la taŭgeco de la konferencejo por diskutadoj kaŭzis ke diversaj kunvenoj, i.a. de Junulfako, LEA-komitato kaj la diskutoj pri la gvidrezolucio, daŭris multe pli longe ol antaŭvidite. Oni ankaŭ povis ekzerci silentadon dum kunveno de Kvakeroj, kiu estis bone vizitata kaj en kiu oni estis informata pri la celoj kaj kredoj de Kvakeroj.

Entute agrabla kaj instiga kongreso. Venontjare okazos kongreso en Rijeka, Jugoslavio. La dato ankoraŭ ne estas certa, sed oni planas ĝin en aŭgusto.



(daŭrigo pri FF-semajnfino)

dimanĉe : 14.00 a h.: k.do W. Geitz, Emmercompascuum parolos al ni pri naturprotektado kaj speciale pri la demando: kiel ni, simplaj homoj, povas helpi en tio. Li parolos pri alternativaj kulturoj kaj vivkutimoj.

Fino je la 15.00 a h. proksimume, tiel ke ĉiu povos reiri per la aŭtobuso de la 16.30 a h. La kostoj estas por NIVON-membroj por la tuta semajnfino 28 gld. kaj 32 gld. por ne-NIVON-membroj. Vi povas ĝiri la sumon al la kasisto de FLE, je la nomo de Bond van Arbeiders-Esperantisten, konto 331133, Rotterdam. Necesas kunporti littukojn aŭ lui ilin en la domo.

BIBLIOTEKO

ĈU VI SCIAS KE NIA ASOCIO POSEDAS BIBLIOTEKON, EL KIU ĈIU ANO POVAS PRUNTI SENPAGE? NUR LA SENDOKOSTOJ ESTU PAGATAJ. LISTO DE PRUNTEBLAJ LIBROJ ESTAS LAŬ VIA PETO HAVEBLA. ADRESO DE LA BIBLIOTEKO : ĉe k.dino J.M. van Riemsdijk-Goossens, Cort v.d. Lindenkade 38, 1067 LK AMSTERDAM.

*p. 32 mld. 18/10/79*

Haveblaj ĉe la libroservo:

Plastaj sako, kun surskribo : ESPERANTO INTERNACIA LINGVO. po: 0,50 gld.(blanka/verda).

"Tra dezerto kaj arbaro" de Henrik Sienkiewicz, aventura romano famkonata. Eldonita de Pola Esperanto Asocio kunlabore kun Heroldo de Esperanto.

X "Praktika Bildvortaro de Esperanto", eldonita de Oxford University Press, 1979a. fl2,50 bele presita, kolora, moderna bildvortaro. Ankaŭ vi nepre havu tiun libron. Vi ĝuos tra-foliumante kaj trastudante ĝin.

"La laŭta Vekhorloĝo" de S. McGill. eld. de Ned. Esp. Junularo, 1979a.

Por studentoj, kiuj jam havas iom da scio pri Esperanto

*memb. 11/9/79*

INSTRUA SERVO

La 5-an de majo pasinta okazis kunveno por la gekursanoj de la I.S. F.L.E. en Amsterdam, centra stacidomo. Gvidis la grupon por progresintoj k.dino A. Kooij van Holst kaj la grupon de komencantoj k.do B. de Wit. Entute partoprenis 16 homoj; ankaŭ la sek.riina kunlaborantino en I.S., kdino Kremer-Limburg ĉeestis por gustumi la etoson kaj metodojn. Dankon ni ŝuldas al k.dino Kooij kaj k.do Hardeveld!

ESPERANTO EN LA AMASKOMUNIKILOJ.

Lastatempe vi verŝajne konstatis, ke la vorto "Esperanto" pli ka pli estas menciita en la radio, TV kaj gazetaro. En televidjurnalo komence de aŭgusto oni sciigis pri la aperigo de Asterix en Esperanto. Fakte la anonco estis malĝusta, ĉar jam la urbestro de Zeist estis ricevinta la unuanekzempleron de tiu libro okaze de la Internacia junulara kongreso. Krome, oni aldonis rimarkon, kiu estis iom ironia. Se mi estus vidinta la programon kaj aŭdinta la ĝustan tekston, mi certe estus protestinta. Oni ŝajnigas kvazaŭ Esperantistoj nur okupiĝas pri tiaj aferoj kaj ne povas pridiskuti seriozajn aferojn. Algemeen Dagblad en aprilo menciis el la rezolucio de la kongreso en Beekbergen nur la paragrafon pri telefonĉeloj. Tio ankaŭ donas stultan impreson. Verŝajne tio estis la intenco. Kaj Esperantistoj evitu la stultajn miksi gravajn kaj negravajn aferojn. Sed, intertempe en A.D. aperis artikolo /intervjuo pri la Internacia Junulara kongreso, okazinta en Austerlitz en julio. Kaj poste oni eĉ aperigis ion pri la gvidrezolucio de la UEA-kongreso, kiu okazis komence de aŭgusto. Intervjuoj pri la IJK ankaŭ en la radio. Dufoje eĉ. Kaj komence de aŭgusto ankaŭ ĉe NCRV-radio intervjuo pri Esperanto. Necesas ke ni pli kaj pli frapu, nun ke ni iom post iom enpenetras tiun mondon!

UEA-KONGRESO, Lucerno, 28a de julio - 4a de aŭgusto.

Partoprenis 1635 personoj el 49 landoj. La temo de la kongreso estis : Lingvaj Aspektoj de Internaciaj Organiziĝoj. En la vasta gvidrezolucio UEA atentigas pri la solvo, kiun Esperanto konsistigas por la gravaj lingvaj problemoj en tiuj organizoj internaciaj. Per Esperanto oni evitos multekostan interpretadaparaton kaj malhelpas ke grava diskriminacio de lingvoj kaj kulturoj okazas. UEA same kiel SAT konstatas ke la int. organizoj ne serioze traktas la lingvan problemon. Ili hezitas doni atenton al Esperanton, kredante, ke tio ja estos klarigata kiel subteno. Oni ne science, objekteve studis la eblecon de Esperanto. Al UN, UNESKO kaj aliaj int. organ. UEA alvokas dediĉi seriozan atenton al la lingva problemaro kaj al Esperanto kiel ebla solvo de tiu problemaro.



NACIIISMO KAJ ESPERANTISMO (28).

La 30-an de junio de la fatala jaro 1914a d.ro Zamenhof respondis al invito de la Hebrea Ligo partopreni la kongreson per letero, en kiu li, kiel ni jam aŭdis, malaprobis kaj kondamnis ĉian naciismon. (Ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon) por poste dolore sperti eksplodon de nacia konkuremo kaj ĵaluzo nacia, egoista, sensenca mortigado, ĉio mantelita per blindigaj sloganoj : la patrio en danĝero, la kulturo, la monarĥio, la detruo de la slava barbarismo.

Malantaŭ ili sin kaŝis veraj, materiaj motivoj. Anglio, kiu ne estis en danĝero, partoprenis kiel anĝelo de revenĝo por la malgranda Belgio, sed se oni rigardas la nombrojn de la germana ŝtal- kaj ferproduktado, oni povas eble diveni tute alian motivon de la anglaj, politikaj gvidantoj: detruai aŭ bremsi la rapidan kreskon de la germana ekonomio.

Kiom koraŝiraj kaj mensfrakasaj tiuj aŭgustotagoj estis por d.ro Zamenhof ni nur povas imagi, sed en 1915 li retrovis la forton publikigi: "Alvoko al la Diplomatoj". Unu linion el tiu publika letero ni jam citis: Ĉiu lando morale kaj materie plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj. (artikolo 10). En la tuta alvoko al la diplomatoj d.ro Zamenhof daŭre emfazas la forigon de la gentaj nomoj, kiujn multaj landoj havas, kiu nomo estas ĝenerale tiu de iu reganta kaj subpremanta gento aŭ tribo, kiu politike reprezentas la tutan regnon kaj stampas ĝin, metante la aliajn regatajn tribojn aŭ popolojn en ombro kaj silento.

D.ro Zamenhof jam antaŭvidis, ke la diplomatoj post la milito reflektos la mapon de Eŭropo kaj li atribuis la kaŭzojn de militoj al la neneŭtralaj, gentaj nomoj de la landoj, kiaj Ruslando, Anglio, Francio, Danio, kaj li samtempe vidis, ke malantaŭ tiuj nomoj kaŝas sin maljusto kaj subpremado, politika kaj kultura. "Kiam la regna lingvo ne havos plu karakteron genteŝovinisman kaj humiligan kaj ne ekzistos plu gentoj-mastroj kaj gentoj-servantoj, tiam ne ekzistos plu kaŭzo por intergentaj militoj". "La malamon kaŭzas nur la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumnio de la unuaj, la natura reagemeco de la lastaj". Por d.ro Zamenhof la efiko de la vorto, de la lingvo, la efiko de la landa nomo estis tiom grava, ke per ĝi laŭ li oni pli aŭ malpli frue atingos plenan egalrajtecon de ĉiuj loĝantoj, se tiu nomo estos nur neŭtrala. Se la nomo estas nomo de gento, ĝi subtenas en la loĝantoj la opinion kaj la senton, ke la lando apartenas nur al tiu gento, kies nomon ĝi portas, kaj ĉiuj aliaj gentoj estas en ĝi nur fremduloj. Eĉ ĉe la plej bona volo la civitanoj de tiu lando ne povos alkutimiĝi al la ideo, ke ili ĉiuj prezentas unu nacion, ĉar por tia nacio simple ne estas vorto.

Ni ne povas liberigi nin de la penso, legante ĉi tiun idealon de d.ro Zamenhof, kiu ne nur estu ŝanĝo al neŭtrala nomo, sed ankaŭ entenas la fondon de nacio kun plenaj demokrataj rajtoj por ĉiuj, ke li precipe pensis kaj imagis pri la stato en Orient-Eŭropo, precipe pri la stato, en kiu troviĝis lia propra lando, Pollando, kie regis Rusoj, Aŭstroj kaj Germanoj, fremdaj gentoj kun fremdaj lingvoj, kiu stato nepre vekis la sopiron inter Poloj al propra nacia ŝtato kun unu kara nacia lingvo.

"Ĉar la gentaj nomoj, kiujn ankoraŭ portas multaj regnoj kaj provincoj estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn". Ni samopinias kun d.ro Zamenhof, ke la nomo multe gravas, kontraŭe al Shakespeare. Nomo povas vekti emociojn, nomo povas reveki okazojn el dolora pasinto. Sed kontraŭ la supra koncepto de d.ro Zamenhof ni emas meti la pli realistan, materiisman klarigon de la subpremado de unu gento super la alia. Verŝajne d.ro Zamenhof ne vidis la politik-ekonomian realon, ke lando aŭ ŝtato akiris identon, stampite de iu potenca, socia klaso- en la okcidentaj, progresintaj landoj la burĝa kaj en la orient-eŭropaj landoj duonfeŭda aŭ nobela kasto- eĉ en ŝtato kun neŭtrala nomo, Aŭstrio. Tiuj klasoj regis per potencpolitiko la ekonomion kaj la kulturan vivon. La grandrusa, carisma regado estis la vol-esprimo de nobeluloj, de grandbienuloj, servataj de oficistoj kaj militistoj. Tiuj regantoj estis la nuraj rajthavaj civitanoj. La grandrusaj kaj aŭstraj regantoj ankaŭ aplikis iun lingvo-politikon, trudante sian lingvon aŭ dialekton al aliaj etnaj grupoj kiel la oficialan, ŝtatan lingvon, kiuj grupoj pro kialoj de praktiko en la socia vivo pli kaj pli estis devigataj akcepti tiun lingvon.

D.ro Zamenhof neniam ĝisvivis la novan mapon de Eŭropo. Se tio estus estinta ebla, li estus vidinta, ke lia idealo de neŭtrala nomo estis nur realigita en du komunistaj landoj: Sovet-Unio kaj Jugo-Slavio. En la unua la revolucio finis la superecon de la Grandrusoj kaj la nova, ruĝa caro, Stalin, estis Georgiano. En la dua ŝtato malaperis la politika supereco de la Serboj. Felice d.ro Zamenhof ankaŭ ne spertis la naskiĝon de propra libera, sendependa lando, la nova Pollando, kies naciismon li ankaŭ kondamnis, ĉar la nova Pollando montriĝis tuj same egoista, same havema kaj same potencama kaj militema kiel ĝiaj antaŭaj subpremantoj.



daŭrigo Naciismo.

Helpate de Francio Pollando kaptis grandan parton de Ukraino, eluzante la malforton de la detruita Sovetunio. Sur tiu parto loĝis ruse parolantaj homoj kaj tio donis belan okazon al multaj Poloj revenĝi sin, ne nur je Rusoj, sed ankaŭ je Judoj. La profetaĵo de d.ro Zamenhof en la Alvoko al la Diplomatoj: "La liberigo, kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estos nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti sur tiu peco mastroj super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj suferis kaj havas koncerne sian patruon la samajn, naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patruon. Estas vere, ke tiu gento, kiun vi privilegias, entuziasme krios: "Vivu la diplomatoj". Ŝajnas al ni tragike, ke ĝuste tiu antaŭdiro realiĝis en la nova, sendependa patrio de d.ro Zamenhof mem.

S.A.

#### ESPERANTO-KANTOJ EN LA RADIO.

Antaŭ ion da tempo, iu kamarado petis diskon por alia kamarado en Esperanto ĉe VARA. Oni ne havis Esperanto-diskon, do anstataŭe elsendis "Pussy Cat". Por ke tio ne plu okazu estonte, F.L.E. aĉetis 3 diskojn kaj 1 kasedon kun la sekvantaj kantoj kaj sendis ilin al NOS. Vi do povas menciigi en via karto al la radio-unuiĝoj, ke tiuj kantoj troviĝas ĉe NOS.

#### LITOVA KANTO - EN ESPERANTO :

1. Al vi, Panjo.
2. Venos ŝtormo.
3. Paĉjo revenis el milito.
4. Lumeto.
5. Sunaj veloj.
6. Turoj.
7. Vojoj tra maro.
8. Ĉe forlasita domo.
9. Maraj leteroj.
10. Ploro de patrino.
11. Rigardo.
12. Pro kio.

#### KANTANTA MIA BIRD' - de Margaret Hill.

1. Kantanta mia bird'.
2. Ĝorgo.
3. La vojon konas mi.
4. Dormu bebo.
5. Bele kaj agrable.
6. Ho vee vee.
7. La nigra rubando.
8. Baniĝo en la roso.
9. Vokas la river'.
10. Erikeja amkanto.
11. Mi donacos al la karulin'.
12. Kanto de fraulineto.

#### TRA LA MONDO - de Olivier Tzant.

1. Voĉe de gitaro mia.
2. Sur stepo moldava.
3. Dancu, dancu.
4. Malproksime sur la monto.
5. Tumbalalajka.
6. Se mi estus fraŭlo.
7. Buklo, buklo.
8. Dekses tunoj.
9. Ni perdis liberecon.
10. Matenkanto.
11. Fore en kampo.
12. Elimeleŝ.

#### DANĜERA UL' - de J Lepuil. (kasedo)

1. Danco-kanzono.
2. Homa vivo.
3. Vilaĝano.
4. Prizonoj.
5. Tion neniam vidis mi.
6. La dizertonto.
7. Paraŝutisto.
8. Danĝera UL'.
9. Leteroj.
10. Kion vi lernis en lernejoj?
11. Botel' da vin'

Ĉe iu ajn elsendkompanio vi povas peti tiujn ĉi kantojn, ĉar NOS prizorgas la diskaron por ĉiuj. En la programaro mi trovis jenajn eblajn programojn:

De VARA feliciteert, sabate, matene. Arbeidsvitaminen de AVRO, marde. Gerard de Vries draait op verzoek, TROS, lunde. Por klasikaj muzikprogramoj ni citu: In de kaart gespeeld, AVRO, ĵaudvespere, Specialiteiten à la carte, TROS, dimanĉevespere. Por tiuj programoj vi uzu la kantojn de la disko pri litovaj kantoj kaj Kantanta mia bird'

Estus plej bone, se sekcio okupu sin dum unu monato pri tiu agado de petskribado alla elsendorganizoj, poste la sekvonta monato alia sekcio. Sekcioj povas ankaŭ peti diskojn por membroj de alia sekcio(j). Ĉiukaze utiligu tiun eblecon! Petu ankaŭ al eksterlandaj korespondantoj sendi poŝtkarton al nederlanda radio, petante kanton en Esperanto.

Antaŭ nelonge okazis la unua internacia konkurso pri heksagona ŝako, inter brita kaj pola grupoj. La oficiala interlingvo de tiu turniro estis Esperanto. La novtipa ŝako tiel estas forte ligita al Esperanto. Do, se vi deziras lerni ion novan... (radio Varsovio, 19/8/'79).

En la Eŭroparlamento elektiĝis s.ro d.ro H.J. Seeler por SPD, FRG. Li estis la dekunua sur la SPD-listo kaj estas Esperantisto. (Heroldo de Esp.).



#### ESPERANTO EN LA NATURAMIKA MOVADO.

Kiel vi verŝajne scias, la naturamika movado TAN oficiale akceptis Esperanton kiel laborlingvon antaŭ multe da jaroj. Necesas de tempo al tempo insisti pri tio, ke Esperanto restu oficiale akceptita lingvo. En la raporto pri la SAT-kongreso vi jam legis, kiel vi povas zorgi pri tio praktike. La estraro de F.L.E. opinias ankaŭ necese, ke vi mem sendu poŝtkarton al la sekr.io de TAN, Werner Werder, Birmenschroferstrasse 19, CH-8004 ZÜRICH, Svislando, petante ke oni daŭre konservu la artikolon 6 a (pri Esperanto) en la statuto de la organizo. Tiu laboro por Esperanto nur postulas poŝtkarton kaj poŝtmarkon de 50 cendoj.

#### KANTADO

Reage al alvoko en antaŭa Kontaktilo, membrino sugestis ke ni interesigu Stem des Volks pri kantado de Esperanto-kantoj por fari kasedon. Por tio necesas, ke ni havu bonan eblecon por registri tian kasedon. Ĉu estas sugestoj? Krome, povas esti ke tamen en F.L.E. estas sufiĉe da membroj de kantĥoroj, kiuj bonvolos ankaŭ blevi sian partituron (pervoĉe). Sendu viajn ideojn, aliĝojn al la asocia estraro.

#### LIBRO-ELDONADO.

Antaŭ iom da tempo F.L.E. ricevis gravan donacon, kiun ni dediĉis al libro-eldonado. Ni ankoraŭ ne decidis, kiun libron ni eldonos, sed pensos pri tio. Niaj ideoj iras en la direkto de nederlandlingva verko, ne tro ampleksa, kiu havas klaran tendencon. Ekz.e la verkoj de la ĵus forpasinta Louis Paul Boon. Sugestoj de via flanko estas bonvenaj. Skribu al la sekr.iino!

#### MALMULTEKOSTA LIBERTEMPO EN BULGARIO.

Pere de ne-Esperantistoj ni eksciis pri la ebleco en bulgara urbeto apud la nigra maro, partopreni malmultekostan (ege malmultekostan fakte) libertempon en hotelo, kiun organizos Esperanto-klubo loka. Necesas ke almenaŭ 25 personoj sin anoncu por tio. La responsulo volonte venos al Nederlando por klarigi al vi la detalojn pri la vojaĝo kaj restado en la hotelo. Verŝajne la kostoj por 20-taga restado en dultita ĉambro estos por 20 tagoj nur inter 550-600 gld. Tio inkluzivas manĝojn en la hotelo, ekskursojn, amuzajn aranĝojn, k.t.p. Se vi deziras havi pli da informoj pri tiu ebleco, bonvolu kontakti la estraron, tiel ke ni povos organizi grupvojaĝon. Ankaŭ ne-Esperantistoj estas bonvenaj!

#### PUPTeatra Internacia Festivalo, Zagreb, 4-a ĝis 7-a de oktobro 1979a.

Partoprenas profesiaj aktoroj el Francio, Hispanio, Rumanio, Pollando, Hindujo, Bulgario, Jugoslavio. Partoprenkestoj: neniam por Esperantistoj. Por junaj homoj eĉ eblas senpaga restado ĉe Esperantistaj familioj. Oni povas ankaŭ tranokti en hotelo por ĉ. 22 guldenoj (kun matenmanĝo). Aliĝu antaŭ la 1-a de septembro, se vi volas senpage restadi. Adreso: Internacia Kultura Servo, YU 41000 ZAGREB, Amruŝeva 5 pf 499, Jugoslavio.

#### SPD REAGIS AL GVIDREZOLUCIO DE SAT-KONGRESO.

Germana socialdemokrata partio reagis al la sendo de la gvidrezolucio de la 52-a SAT-kongreso. Almenaŭ oni transdonos la gvidrezolucion al la Eŭroparlamentanoj. Ni tuj sendis kopion de tiu letero al PvdA kun peto transdoni la gvidrezolucion ankaŭ al la nederlandaj parlamentanoj.

#### NOVAJ AKADEMIANOJ

Novaj membroj de la Akademio de Esperanto fariĝis: Albert Goodheir, Favrizio Pennachietti, Claude Piron kaj Baldur Ragnarsson. Ili anstataŭas mortintajn aŭ eksigitajn membrojn.

#### ESPERANTO EN ĈINIO.

Tiuj, kiuj regule ricevas la revuon "El Popola Ĉinio" povas konstati, ke oni regule parolas pri Esperantistoj en Ĉinio. En Ŝanghaj s.rino Ŝiji-nin, Changsha Lu, 149 Long, 32 Hao, Shanghai, gvidas kurson por 14 lernantoj. Fine de ĉi tiu jaro ŝi volas aranĝi ekspozicion kaj petas al E-istoj sendi ĉiajn materialojn al ŝi. Oni reciprokos per bildkartoj. En la sama numero de la revuo estas intervjuo kun la lingvisto kaj Esperantisto prof. Ŝecencz, kiu tradukas "La tragedio de la homo" en la ĉinan precipe per la Esperanto-traduko de Kalocsay, ĉar tiu superas alilingvajn tradukojn.